

POLA ESPERANTISTO

JARO XXII. * FEBRUARO 1928. * N-o 2.



ROK XXII. * LUTY 1928. * Nr. 2.

ESPERANTYSTA POLSKI

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW.

ADRES: KRAKÓW, ULICA LUBICZ Nr. 34.

REDAKTOR PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTO

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—. duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—.

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedyńczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

OGŁOSZENIA:

1 strona	Zł. 60.—
1/2 strony	„ 32.—
1/4 strony	„ 17.—
1/8 strony	„ 10.—

ANONCOJ:

1 paĝo	Zł. 60.—
1/2 paĝo	„ 32.—
1/4 paĝo	„ 17.—
1/8 paĝo	„ 10.—

ATENTO!

KUN JANUARA NUMERO DE NIA REVUO NI
MALFERMIS LA FAKON „KORESPONDADO“.
ANONCETO DE 10 VORTOJ (krom adreso) Zł. 1.

TREŚĆ — ENHAVO:

B.: POSTĘPY SPRAWY JĘZYKA POMOCNICZEGO W POLSCE. —
S. L. GRENKAMP-KORNFELD: LITERATURA POLSKA W JA-
PONJI. — I. LEJZERO WICZ: PROGRAMOJ KAJ IDEOJ. — JERZY
ŻUŁAWSKI: LA VENDITA ANIMO. TRAD. J. ŠAPIRO. — LIANG-
ĈU-VAJ: PRI MILITA „SEKURECO“. — SOCIA VIVO. — ESPERANTO-
MOVADO. — JÓZEF ORZECZ: PRI KOMPLETIGO DE LA VOR-
TARO. — LINGVAJ PRIPENSOJ. — POLLANDA KRONIKO. —
KRONIKA ZAGRANICZNA. — KOMUNIKOJ P. E. D. — ALVOKO
DE LA REDAKCIO. — RESPONDOJ DE LA REDAKCIO. — ONI
ALSENDIS AL LA REDAKCIO. — ADMINISTRACIAJ SCIIGOJ.

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXII. JARO.

KRAKÓW
LUTY 1928 FEBRUARO

Nr. 2. N-o.

POSTĘPY SPRAWY JĘZYKA POMOCNICZEGO W POLSCE.

ROZPOCZĘCIE wykładów w uniwersytecie warszawskim o językach pomocniczych jest niewątpliwie punktem zwrotnym dla rozwoju tej sprawy, tak ważnej dla ułatwienia stosunków międzynarodowych. Jest rzeczą zrozumiałą, że jeżeli mówimy o językach pomocniczych, nie możemy mieć na myśli żadnego innego języka, prócz esperanta, gdyż żaden z innych projektów językowych nie utrzymał się i nie stworzył ruchu tak obszerne zataczającego kręgi wśród wszystkich ludów świata. Sprawa tego języka, dosyć silnie nawet w Polsce przed wojną rozwinięta, skutkiem wojny doznała znacznego opóźnienia, aż wreszcie teraz znowu przyszła do głosu.

Dzięki poparciu Jego Magnificencji p. Rektora Uniwersytetu Ks. Antoniego Szlagowskiego, Senat Akademicki na wniosek p. Dziekana Profesora Handelsmana, zezwolił Drowi Bujwidowi, emer. profesorowi Uniwersytetu Jagiellońskiego na prowadzenie wykładów w trimestrze zimowym. Wykłady cieszą się wśród młodzieży wszystkich wydziałów dosyć znacznym zainteresowaniem: na pierwszym wstępnym wykładzie sala nie mogła pomieścić licznie zebranej publiczności oraz słuchaczy uniwersytetu, na dalszych sala jest stale zapełniona. Prof. Bujwid wyłożył już w pierwszych sześciu wykładach treściwie zebraną historję usiłowań licznych uczonych w kierunku stworzenia języka prostego i dla wszystkich łatwego do nauki. Niestety ze wszystkich tych prób, których dotąd można było naliczyć już 350, tylko b. nieliczne zaliczyć można do mniej lub więcej udatnych i te nie przeniosą liczby kilku: do nich należą niektóre projekty uproszczonej łaciny. Żaden jednak nie może się równać z językiem wynalezionym przez naszego rodaka Dra Zamenhofa. Jako naj-

lepszy dowód posłużyć może okoliczność, że słuchacze obecnych wykładów już po sześciu wykładach, odbywanych po polsku i częściowo tylko zdaniem w języku Esperanto, pisanymi na tablicy, po wyłożeniu zasad gramatyki w przeciągu niespełna pół godziny, rozumieć zaczynają dalsze wykłady w tym języku bez żadnej szczególnej trudności, potrzebując wyjaśnienia niektórych wyrazów, rzadziej używanych. Można twierdzić śmiało, że człowiek wykształcony, znający początki łaciny lub francuskiego, będzie mógł po dziesięciu wykładach porozumieć się w tym języku. Po ukończeniu wykładów, których liczba nie przekroczy 20, wszyscy słuchacze będą mogli złożyć kollokwium z treści wykładów o historii języków pomocniczych w języku Esperanto, oraz napisać stosowne wypracowanie pisemne w tym języku.

Z chwilą, gdy takie wykłady odbywać się będą w uniwersytecie, sądzić należy, że Ministerstwo Oświecenia zechce bliżej zająć się sprawą wprowadzenia języka Esperanto do szkół, przede wszystkim do szkolnictwa zawodowego, któremu ułatwi ten język stosunki z szerszym światem, bo niewątpliwie ruch ten za lat kilka wszędzie się szeroko rozwinie. Przypomnijmy tylko, że już w latach 1921—1922. było w Niemczech 162 miast, gdzie w szkołach wprowadzono ten język do nauki, że w tym czasie było tam 1592 kursów języka Esperanto, w których przyjęło udział 40.256 osób dorosłych, w tej liczbie 20.456 robotników różnych kategorii, dla których nie była dostępną nauka języków obcych, wymagająca dużo czasu i pieniędzy. Wymieniliśmy postępy, a raczej stan sprawy tylko w Niemczech: Francja, Anglja, Czechy, Finlandja, Bułgarja, a dalej: Japonja, Stany Zjednoczone, Brazylja mają dzisiaj mocno już rozwinięty ruch w kierunku zaprowadzenia w całym szkolnictwie początkowem języka w Polsce wynalezioneo, ale w tejże Polsce najmniej rozpowszechnionego. Jak wyglądamy wobec tego przed całym światem cywilizowanym?

Mamy przed sobą dużą lukę do wypełnienia.

Życzących sobie poznać bliżej niektóre cyfry odsyłam do wydanej niedawno książki Dra Privat: *Historio de Esperanto*. F. Hirth & Sohn. Leipzig 1927.

B.

LITERATURA POLSKA W JAPONJI.

W grudniu u. r. pojawiła się Marta Orzeszkowej na półkach księgarskich Japonji w języku japońskim. I któż przyczynił się do tego? Esperanto, o którym tak się mało pisze i mówi u nas.

Jeszcze w roku 1910 Dr Zamenhof przetłómaczył Martę na język esperancki. Wyszła Marta nakładem znanej księgarni paryskiej Hachette'a i doczekała się dwóch nakładów. Dzieło bowiem cieszyło się i cieszy

wielką popularnością wśród esperantystów wszystkich krajów i wszystkich narodowości. Jeślibyśmy spotkali kogoś, któryby twierdził, że jest esperantystą, a na nasze zapytanie, czy zna Martę, odpowiedziałby przecząco, możemy mu śmiało powiedzieć, że nie jest esperantystą! Tłómaczenie bowiem Marty uchodzi za najlepsze z tłumaczeń Zamenhofs. Dlatego każdy esperantysta musi czytać Martę, choćby dla samego zapoznania się z językiem esperanckim!

W dwa lata później t. j. w r. 1912 Marta Orzeszkowej ukazuje się w szacie chińskiej. Tłómaczył ją z esperanta profesor uniwersytetu w Pekinie. I oto teraz Japonja przyswaja sobie literaturę polską. Tłómaczenia Marty dokonał znany dramaturg japoński Kijomi Rikuro.

Nie na tem kończy się działalność naszych przyjaciół japońskich. W jednym z najpoważniejszych swych miesięczników *La Revuo Orienta* (Przegląd Wschodni), Tokio, Ushigome, Shin'Ogauamachi III—14, pojawiają się stale studia nad literaturą polską. Ostatnio (w numerze listopadowym i grudniowym) znajdujemy dokładne opracowanie Faraona. W poprzednich zeszytach znaleźliśmy kilka nowel Prusa i Orzeszkowej. Dodać jeszcze należy, że także w towarzystwach esperanckich pilnie czytują utwory literatury polskiej. W ubiegłym sezonie letnim czytano na wyższych kursach esperanta — Bałuckiego *Kuzynek* (tłóm. Grenkamp) i sprzedano 200 egzemplarzy!

Często, bardzo często Japończycy proszą o dostarczenie im Reymonta, Żeromskiego i t. d. Zamówienia i zapytania wpływają. Niestety — jak nam wiadomo — brak pieniędzy nie pozwoli esperantystom polskim zadowolnić i to nie tylko japończyków ale i cały świat! Przed wojną księgarnia *Arcta* wydała wiele książek, które są zupełnie wyczerpane. W czasach powojennych nie znalazła się jeszcze rzutka księgarnia polska, któraby poszła za przykładem choćby takich firm jak *Rudolf Mosse*, Berlin i *Ferd. Hirt & Sohn*, Lipsk. Rękopisy i to pierwszorzędných autorów naszych i w doskonałym tłumaczeniu są gotowe. Która z firm polskich zabierze się do dzieła?

Z okazji Międzynarodowego Kongresu Esperantystów w Gdańsku, bardzo wielu wybitnych japończyków m. i. prof. Dr. Osada (Tokio), prof. Dr. Hasigaua (Formosa), Dr. inż. Ossaka (delegat rządu japońskiego), Toki Zenmaro, redaktor znanego dziennika *Tokyo Asahi Shinbun* i t. d. skorzystali ze sposobności i zwiedzili Mekkę esperanta — Polskę.

Spodziewajmy się, że ten bezpośredni kontakt przyczyni się do jeszcze żywszych stosunków i wymiany myśli z esperantystami Wschodu, którzy mogą wiele zrobić dla nas, naszej literatury i imienia Polski.

Już tylko te wymienione fakty dowodzą, że esperanto przysługuje

się i może się jeszcze więcej przysłużyć sprawie polskiej. Rząd nasz i społeczeństwo nasze musi się liczyć z tem i nie bagatelizować tego środka propagandy.

S. J. Grenkamp-Kornfeld.

PROGRAMOJ KAJ IDEOJ.

En la daŭro de la lasta tempo nia gazetaro pli kaj pli multe atentigas la Esperantistaron pri la iompostioma malaperado de la gvidanta ideo en nia movado. Tiu-ĉi karakteriza senideigo prave embarasas kaj zorgigas tiujn probatalantojn de nia afero, kiuj saĝe kaj laŭsperte konkludis, ke neeble estos por ni ekzisti sen idea fundamento. La lastaj sukcesoj de Esperanto estas, vere, grandaj kaj konsiderindaj, sed ni ne faru al ni iluziojn, ke sole per ili nia movado mem estas plifortigata.

Aliaj potencaj movadoj en la mondo posedas siajn programojn. La E-movado neniam havis programon, sed ĉiam celon, noblan kaj altan celon. Ni cetere ne bezonis programon — tro malgranda estis nia anaro por trumpetadi programojn, kaj tro grandaj estus la internaj malpacoj pro fiksado de iu programo. Nin fortigis ĉiam la spirito de nia afero, tiu vastampleksa, de multaj eĉ apoteozita interna ideo de la Esperantismo kaj bone estis, ke tiu ideo estis preskaŭ oficiala. Ĝi estis fonto, nutranta la trunkon de nia movado. Nia afero ĝojige kreskis, kaj la unueco de la esperantistara plimulto kreis rimarkindan fronton. Ne malhelpis ankaŭ, ke kelkaj eĉ gravaj propagandistoj de nia afero foriris de ni, ĉar ili ne povis konfesi nian ideon. Tiuj subitaj ventoj — kiel la Majstro alegoriis en „La Vojo“ — sole refreŝigis nin.

Nia movado ne povas havi programon, ĉar ĝi estas mondampleksa kaj iu ajn difinita programo (en senco, komprenata de aliaj movadoj) sole paralizus nian vastan agadon. Sed ankaŭ sen ideo ĝi ne kapablas vivi. Senigi Esperanton de ĉia pli alta koncepto, nomi ĝin sole lingvo kaj rimedo — tio eble ne malutilos iam pli poste, kiam ni estos jam venkintaj absolute la indiferentecon de la tuta mondo rilate nin, kaj ni sekve ĉesos esti movado. Sed nune, dum ni ankoraŭ devas batali por la efektivigo de la „homara sonĝo“, ni ne povas fidi je sekaj argumentoj kaj ni ne rajtas ekstermi la floron de Espero, kiu inspiris nian movadon ekde ĝia naskiĝo kaj feliĉe estas ĉiam ĝia plej fidela ŝirmanto.

Mi multfoje havis la eblecon observi la vivon de diversaj multaj E-istaj societoj — kaj la rezulto de miaj observoj estas: kie Esperanto estas traktata sole kiel lingvo, tie veraj Esperantistoj tute ne ekzistas. Oni sentas la impreson kvazaŭ en tiuj societoj Esperanto estus en la lasta vico. Ne miru! Kie mankas entuziasmo por ideo, tie idea afero ne povas disvolviĝadi, kaj tiu malviveco en la diritaj societoj plej bone pravas, ke

tamen Esperanto estas ligita kun ia interna ideo, sen kiu ĝi restas malviva.

Antaŭ jaroj esperantistoj estis konsiderataj, kiel noblaj idealistoj, kaj sinceraj bonaj homoj simpatiis nin. Nun oni ĝenerale kredas esti naiva fantaziulo, konfesante altan Zamenhofan pensaron. Iam kompetentuloj laŭdis nian movadon pro belega nedifinita sento, entenata en ĝi. Tiu sento fortigadis nin. La Esperantistaro mem estis la „reunuigita homaro“ en mi-niaturu.

Ido ekzistas jam 20 jarojn kaj ĝia stato daŭre similas al tiu de ftizulo, kiun la sorto kondamnis je senkondiĉa morto. Kial ĝi tiel vegetaĉas? Ĉu la lingva sistemo ne taŭgas? Ja ĝi pretendas esti plibonigo de nia Esperanto! Nu, la spirito mankas en ĝi, tio, kio estas la esenco kaj kondiĉo de ĉia natura disvolviĝado kaj evoluado de lingvo. Idistojn in spiras neniu alta penso (propra al ilia movado), neniu entuziasmo. Kio do havigu al ili fervoron kaj ĝojon, tiom necesajn en ĉiu movado?

Ni esperantistoj posedis altan ideon, kiu dum multaj jaroj gvidis nin al sukcesoj kaj triumfoj. Fine ni malkonfensis ĝin. Nia movado, antaŭe unueca kaj solidara, nun ŝajnas esti premata pro la diversaj kurentoj, naskiĝantaj en ĝi. Oni nepre deziras trudi al ĝi programojn, kiuj sole povas malutili al la tuteco de nia afero. Ni rezignu programojn, lasante nian movadon disvolviĝadi laŭ ĝia malnova maniero, konforme al la spirito, kiu vivigis kaj edukis ĝin.

l. Lejzerowicz.

LA VENDITA ANIMO.

DE JERZY ŻUŁAWSKI.

Iafoje ŝajnas al mi, ke mia animo ne apartenas al mi. Mi vendis ĝin kaj mi ne havas jam la rajton fari kun ĝi, kio plaĉas al mi. Oni aĉetis ĝin kaj mi eĉ ne sciis pri tio; oni donis al mi moneron en la manon, mi ĝin perdis — sed la animo jam ne estas mia.

Iam tio estis, iam, tre... Kiom da jaroj?

Mia Dio — ĉu ĉiuj jaroj kaj ĉiuj horoj estas egalaj?

Kelkaj estas tre longaj.

Tio estis mia unua amo...

Ni amis nin tre... Ĉu mi rakontu la okazintaĵojn de la unua amo?

Per strangaj ili iris vojoj kaj strange finiĝis. Hodiaŭ mi scias: tio estis malsana amo!

Iutage, irante matene al ŝi, mi ekaŭdis je la ŝtuparo hioban sciigon: ŝi prenis nokte venenaĵon.

Mi estis kulpa je tio.

Mi kunvokis kuracistojn kaj ili savis ŝin.

Poste denove estis mirindaj aferoj kaj hodiaŭ mi eĉ ne scias, en kiu parto de la mondo ŝi troviĝas nun.

Sed la animo mia jam ne apartenas al mi; ŝi aĉetis ĝin en tiu memorinda nokto — por la prezo de sia vivo. Kaj ŝi rajtas fari kun mia animo, kio plaĉas al ŝi. Ŝi rajtas vundigi ĝin per sopirado, rajtas turmenti per riproĉoj. Ŝi rajtas, ĉar ŝi aĉetis mian animon.

Kaj mi ne havas eblecon elaĉeti reen mian animon. La plej granda pago, kiun mi povas doni, ne egaligos al la prezo de ŝia vivo, kiun ŝi oferis al mi.

Tradukis el pola *J. Ŝapiro*.

PRI MILITA „SEKURECO“.

de *Liang-ĉu-ŝaj*.

La vorto „sekureco“ fariĝis laŭmoda. Ĉe Ligo de Nacioj oni konstante parolas pri Senarmigo, Arbitracio kaj Sekureco. Ĉiuj planoj pri redukti armeojn malsukcesis, ĉar oni volis unue ricevi garantiojn pri Sekureco. „Eĉ ekestas opinio popola, diris delegito en Ĝenevo, kiu suspektas sub tiu vorto — sekureco — novan pretekston por ne senarmiĝi“.

Interese estas iom observi la vivon de homoj en civilizitaj urboj laŭ tiu rilato kaj poste kompari societon de nacioj kun societo de individuoj. Unue ni rimarku tion ĉi: en nuna Ĉinujo la malsekureco de la loĝantoj devenas ĝuste de la ekzisto de armeoj kaj armiloj en diversaj manoj. Unu el la grandaj kaŭzoj de malkontenteco kontraŭ eksterlandanoj estas ĝuste ilia konstanta komercado de armiloj al diversaj generaloj.

En eŭropa urbo, ni diru ekzemple nederlanda, ekzistas nun preskaŭ plena sekureco. Oni ne portas armilojn. Oni plej ofte eĉ tute ne havas iajn en domo. Oni tute ne timas atakon en strato. Multe pli oni timas aŭtomobilan akcidenton.

Antaŭ cent jaroj la individuoj kutimis dueli. La nobeloj solvis per spada batalo siajn interpersonajn aŭ inter-familiajn konfliktojn. Nun oni iras al pacjuĝisto. Kutimo kaj leĝo igas tion tute ordinara. Eĉ oni progresis unu ŝtupon pli: oni klopodas interpaciĝon rektan, ĉu per amikoj, ĉu per ambaŭ advokatoj, por eviti proceson. Edukado efikis.

Ligo de Nacioj fondiĝis en 1920 kaj starigis la Hagan Tribunalon en 1922. Sin tenas for ankoraŭ Usono, Sovetaj Respublikoj, Turkujo pro diversaj kaŭzoj. Tamen iom da kutimo ekestas. En Hago estis juĝataj jam kelkaj procesoj inter gravaj ŝtatoj. El Ĝenevo la interveno de la Ligo haltigis unu militon (greka-bulgaran) kaj evitis eble du aliajn per solvo de konfliktoj.

Kvankan tre malperfekta, kvankam ankoraŭ tro regata de la grandpotencoj, tamen la Ligo kreas atmosferon dank' al kreskanta alproksimiĝo kaj alfluo de la malgrandaj regnoj. Eĉ la oftaj renkontoj inter potencaj ŝtatestroj utilas iom al paco. Interparolo inter Litvinoff kaj Chamberlain forigis kelkajn falsajn ideojn eble ambaŭflanke. Kreiĝas iom post iom internacia societa humoro malfalvora al milito.

Eĉ la plej pesimistaj homoj sentas, ke estus pli malfacile hodiaŭ ol en 1914 deklari militon. Ekvivante pli en societo, kunvenante pli ofte, dependante pli ol antaŭe unu de la aliaj, la ŝtatoj eksentas ian ĝenon pri milito. La afero fariĝis jam pli riska, pli danĝera politike ol antaŭe. Tiun „atmosferon“ ankaŭ forte influas la unuanima popolopinio de laboristaj rondoj, ĉie malfavoraj al milito, kaj ĉie gajnantaj pli da premo-povo.

Kun ĉiu nova jaro sen milito kun ĉiu nova konflikto pacigita en Ĝenevo aŭ Hago kompreneble plifortiĝos la packutimo kaj samtempe la edukado, sed la vojo estas longa kaj la ekonomiaj kaŭzoj de milito restas ankoraŭ ne forigitaj.

Esperanto Nr. 330.

SOCIA VIVO.

El la Bulteno de la Internacia Laboroficejo, regule aldonita al la gazeto Esperanto ni citas kelkajn interesajn detalojn.

La laboro de la Oficejo ĉiam pligrandiĝas. La Leĝdona Serio, en kiu la Oficejo eldonas tekstojn pri laboro en ĉiuj landoj, en sia volumo por 1922 havis 1150 paĝojn, en 1924 jam 2000 paĝojn. La Oficejo faras periodan enketon en multenombraj landoj pri la valoro de la salajroj kompare je la prezo de la vivrimedoj. La problemo pri profesia orientigo por eltrovi la naturajn kapablecojn de la infanoj por direkti ilin al la pli taŭgaj por ili profesioj estas la temo de la pristudado. Laŭ demando de la Ligo de Nacioj oni preparas enketon pri la laborkondiĉoj en la navigado. La Oficejo preparas ankaŭ gravan enketon pri la normigo de la industria higieno. Inter aliaj interesitaj landoj Belgujo konfirmis jam kvin projektojn de internaciaj konvencioj: pri laborakcidentoj, profesiaj malsanoj, traktado de naciaj kaj esterlandaj laboristoj, dungokontraktoj de maristoj, reenpatrujigo de maristoj. Svislando, Hindujo, Irlando ankaŭ konfirmis konvenciojn. Ni ne povas citi pro manko de loko ĉiujn gravajn projektojn kaj decidojn de la Oficejo, ni mencias nur ankoraŭ kelkajn ciferojn montrantajn la gravecon de studoj. Perdoj kaŭzataj per laborakcidentoj en Germanujo dum 1925 ampleksas 5285 mortigajn akcidentojn kaj 50767 akcidentojn de daŭra nekapableco por laboro. La nombro de laborinvalidoj ricevantaj kompenson estas 428421. La sumo pagita por kompenco estis 260 milionoj da markoj. En Britlando la nombro de akcidentoj minejaj dum 1925 estis 189223.

ESPERANTO-MOVADO.

La Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko sendis al ni la sekvantan cirkuleron:

Novaj enketoj kaj eksperimentoj
rilate la mondhelplingvajn sistemojn.

La eksperimentoj fariĝas sur la bazo de kunlaborado inter

1. „IALA“ en New York kaj
2. „Instituto Jean Jacques Rousseau“ en Genève.

I. IALA estas la nomo por Amerika Asocio por Internacia Helplingvo (International Auxiliary Language Association in the United States, Incorporated). Ĝi estas fondita en la jaro 1924 en New York kaj tute neŭtrala asocio, havanta kiel celon la enkondukon de unu helplingvo, kiu estu instruota al la lernantaro en ĉiuj landoj kiel taŭga rimedo por komuna interŝanĝo de pensoj inter personoj de malsamaj gepatraj lingvoj. Tiu celo postulas neŭtralan kaj objektivan esploron de la tuta mondhelplingva situacio.

Pro tio la laboroj de IALA etendiĝas sur du ĉefaj kampoj:

1. IALA klopodas interesigi grandajn rondojn por la helplingva movado;
2. ĝi faras esplorojn sur 3 kampoj:
 - a) sociologia
 - b) lingva
 - b) pedagogia kaj eduka.

II. Rilate la 3an punkton IALA kunlaboras kun la Instituto J. J. Rousseau en Genève.

Ĉi tiu instituto, kunlaboranta kun la universitato de Genève, estas altlernejo pri pedagogia kaj edukaj sciencoj, kiu speciale interesiĝas pri infanpsikologio kaj pri eksperimenta pedagogio. Tial ĝi ankaŭ interesiĝas pri la enkonduko de Esperanto en la lernejoj. Serio da konsultoj jam okazis en Genève kaj en New York dum la jaroj 1925/26 inter profesoro P. Bovet, direktoro de la Instituto J. J. Rousseau, kaj reprezentantoj de IALA kaj reprezentantoj de la Instituto de eduka esploro ĉe la „Institute of Educational Research, Teachers College, Columbia University“.

Dum ĉi tiu kunlaborado oni akceptis programon, laŭ kiu oni celas

- 1) mezuri la progresojn dum lernado de iu helplingvo en lernejoj, kies instruistoj deziras serioze kunlabori,
- 2) prepari diversspecajn „testojn“ (A. L. testoj-Auxiliary Language testoj) kaj eksperimentadi sur la bazo de tiuj testoj kun la helpo de la instruistoj, kiuj deziras kunlabori.

IALA kaj la Instituto J. J. Rousseau pro siaj celoj bezonas la kunlaboradon de la reprezentantoj de la diversaj mondhelplingvaj sistemoj kaj esperas, ke ili subtenos energie ĝian laboron.

Ni kunlaboru.

En la supra artikolo pri novaj enketoj kaj eksperimentoj ni atentigas, ke IALA, same kiel la Instituto J. J. Rousseau, bezonas la kunlaboradon de la reprezentantoj de la diversaj mondhelplingvaj sistemoj. Ekzistas neniu kaj nenia kaŭzo, ke ni, Esperantistoj, rifuzu tian kunlaboradon. Tute kontraŭe! Ni ĝoju pri la fakto, ke du tiom gravaj institucioj, kiel IALA kaj Instituto J. J. Rousseau, neŭtrale kaj objekte volas esplori la mondhelplingvan situacion, donante tiamaniere al ni la eblecon, montri sur la vojo de novaj enketoj kaj eksperimentoj, kaj precipe sur la vojo de test-eksperimentoj, la ĝeneralan taŭgecon de nia lingvo kaj precipe ĝian pedagogian kaj edukan valoron.

Multaj el niaj rondojn persone konas sinjorinon Alice V. Morris, kiu tiel simpatie reprezentis IALA-n dum niaj lastaj internaciaj kongresoj, kaj

ili scias, kiel favora ŝi estas al nia movado. Multaj ankaŭ konas sinjoron profesoron Bovet, kiu de la tempo de la Pedagogia Konferenco en Genève en la jaro 1922 (aranĝita de la Ĝenerala Sekretariaro de la Ligo de Nacioj) ĉiam tre bone sukcesigis nian aferon. Do, demandite, ĉu la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko volos kunlabori kun IALA kaj la Instituto J. J. Rousseau, por havigi al ĉi tiuj institucioj la necesan materialon, mi tre volonte konsentis kaj promesis fari ĉion por tia kunlaborado, ĉar mi havas la nepran konvinkon, ke el ĝi ankaŭ rezultiĝos multaj profitoj kaj sukcesoj por la Esperanto-movado.

Mi baldaŭ al la interesuloj — t. e. al la instruistoj, kiuj aliĝis al nia movado — pli detale kaj regule raportos pri la laboro farenda. Mi turnas min al ĉiuj instruistoj esperantistaj, precipe ankaŭ al tiuj, kiuj jam instruis Esperanton en lernejoj. Pro tio mi unue petas ĉiujn asociojn, grupojn k. t. p., ke ili sendu al mi kiel eble plej multajn adresojn de instruistoj ĉiuspecaj, kiuj jam estas Esperantistoj aŭ montras iun ajn intereson por niaj lingvo kaj movado.

Per mia laboro mi interalie esperas, povi doni al nia movado la ofte deziritan statistikon por instruistoj kaj lernejoj.

Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko.

Dro Dietterle.

ESPERANTO EN LERNEJO.

Senato de l'Danzig-Gdańsk publikis dekreton, laŭ kiu ĝi konsentas pri la nedevigaj kursoj de Esperanto en la 6a ĝis 8a lernejoj de la elementaj lernejoj, kondiĉe ke ekzistu taŭgaj instruistoj aŭ instruistinoj kaj ke la laŭplana instruado ne estu malhelpata per tiuj kursoj.

Supra-Aŭstria Esperanto Societo Linz a. D. sciigas, ke la landa lernejestraro enkondukis Esperanton en enu lernejon. 72 knabinoj estas allasitaj por la instruado. (Heroldo N-ro 6).

PRI KOMPLETIGO DE LA VORTARO.

Sufiĉa tempo pasis jam por povi paroli pri serioza laboro en pola Esperantujo. Mi tuŝas unu flankon de tiela laboro.

Ni posedas unu vortaron por Poĵoj (espa-polan kaj pola-espan) de Grabowski.

Sed kiu bezonis vortaran helpon ĉe la tradukado, ho ve, li kelkfoje sentis sin forlasita de tiu fidinda — kiel li ĉiam ĝin opiniis — amiko. Ne estas miriga, ke unu homo ne sufiĉas por tiel ampleksa laboro simple pro mallonga vivo kaj limigo al sia profesio, inklino, studosfero, socia pozicio, vivrilatoj ktp., ktp. Eskter „liaj“ limoj ekzistas ankoraŭ pli granda mondo kun aliaj bezonoj, emoj, esprimoj, evoluo. Ni havas plenan estimon por kolosa laboro de nia poeto Grabowski, neniel malgrandigas lian meriton la fakto, ke ekster lia vortaro troviĝis ankoraŭ sufiĉe multaj ebloj por esprimi esperante la neregistratajn de li vortsignifojn kaj nuancojn.

Tian laboron povas preni sur sin nur sufiĉe granda aro da homoj

kleraj, el kiel eble plej multaj sciofakoj, konantaj ekster sia gepatra ankaŭ aliajn lingvojn, ĉar en esperanto kaŝiĝas ankaŭ kvazaŭ lingvofilozofio.

Tia laboro devas esti estrata de iu aŭtoritato. Ĝis kiam ia Akademio ne ŝargos sin per ĝi, mi opinias „Polan Esp-iston“ unua - vice taŭga por instigi kaj iniciati la aferon.

La plej urĝa estas la kompletigo de pola-esp-ista parto. Mi proponas do preparoli la aferon publike kaj komenci la kolektadon kaj „kartotekadon“ de novaj (aŭ mankantaj) traduk-eblaĵoj. La liston de novaj esprimoj (po kelkdekoj) oni povus publikigi en Pola Esp-isto por provoki kritikon.

Laŭdezire mi estas preta liveri la unuan liston de esprimoj netroveblaj en la pola-esp-ista parto de Vortaro.

Tarnów.

Józef Orzech.

LINGVAJ PRIPENSOJ.

ANKORAŬ PRI -IO.

Dum la Danzig'a kongreso Dro Privat metis sur la tagordon la jam malnovan aferon de -io kiel landnomo. Dum la Viena kongreso, kiel ni memoras, S-ro Kostecki, tiam la vicprez. de P. E. A., petis kondamni la uzadon de tiu pseŭdo-afikso kaj la kongreso fakte alprenis decidon (ĉu formale validan aŭ ne, estas indiferece, ĉiukaze deziresprimon de esperanta publiko sufiĉe multenombra) kontraŭ -io kaj rekomendon pri fideleco al la Fundamento.

Nun ree Dro Privat tuŝis la „problemon“ en sia organo „Esperanto“. Ni ricevis pri la afero du publikajn leterojn: unu venis de S-ro Buttler (Londono), akre kontraŭbatalanta la -io pro taktikaj motivoj samkiel ĉian kontraŭfundamentecon; la alian de prof. Cart ni plene represas ĉi-tie:

Esperantista Akademio

Parizo, la 15-an de jan. 1928.

La Prezidanto.

Kara Sinjoro Redaktoro!

Dro Privat parolas en la januara numero de „Esperanto“ pri „eminentuloj“, kiuj ian tagon povus perfidi. Ĉu eble? Mi tre dubas. Se vere, mi povas certigi, ke inter la eminentaj perfidontoj (?) troviĝas neniu Akademiano. Ĉiuj estas kaj restos fidelaj ankaŭ, kiam post multaj, multaj jaroj — kiujn apenaŭ kelkaj verŝajne ĝisvivis — la Registaroj oficialigos Esperanton, ili tiam fidele sekvos la vojon montritan de Dro Zamenhof en la Washington' a Kongreso, ili opinias kiel li, ke, se „iam registare starigota komitato... traktos sian taskon serioze... la postkomitata Esperanto restos la sama lingvo, kiel la Esperanto antaŭkomitata“ kaj ke „nur eble kelkaj nunaj formoj fariĝos arĥaismoj... neniel rompante la kontinuecon de la lingvo kaj neniel ruinigante la valoron de tio, kion ni ĝis nun akiris“.

Ni ne ŝanceliĝis hieraŭ, ne ŝanceliĝas hodiaŭ, ne ŝanceliĝos morgaŭ; firme kaj tute trankvile ni daŭrigu nian poresperantan laboron!

Kun kora saluto

Th. Cart

Prezidanto de la Lingva Komitato.

EL LA LETERO DE Sro PRIVAT AL Sro CART NI ANKAŬ REPRESAS JENAJN LINIOJN.

La Viena Kongreso petis la Akademion starigi liston de landnomoj permeseblaj laŭ la Fundamento. Tiun proponon vi konsideris nepraktika.

Do mi havas la honoron, proponi al la Akademio, ke ĝi bonvolu tiam ekzameni la uzadon de landnomoj en UEA-dokumentoj dum la lastaj jaroj kaj tute klare indiki nome, kiujn formojn ĝi konsideras kontraŭfundamentaj.

Mi tiam proponos al la komitato de UEA, ke ĝi per voĉdono decidu, ke tiuj formoj ne rajtas esti uzataj en la oficialaĵoj de la Asocio kaj devas esti anstataŭataj per landnomoj en -ujo- aŭ -lando. La Jarlibro de 1928 estas jam preta, sed por la gazeto kaj por la sekvanta jarlibro respondo sufiĉas antaŭ la monato junio.

Se ĉiuj bonvolas forlasi iun ajn konsideron pri personoj, prestiĝo, venko aŭ malvenko, kaj vidi nur la bonon de nia lingvo, kiun ni ĉiuj celas, mi estas certa, ke tiu dorno povas malaperi kaj fari lokon al nova kuraĝo por la komuna sankta afero.

Atendante vian afablan respondon, mi restas, tre estimata sinjoro Prezidanto

tutkore via

Edmond Privat.

Konsentante plene kaj senrezerve kun prof. Cart, ankaŭ ni principaj motivoj de l'esperanto-propaganda vidpunkto — disciplino pli ol en aliaj aferoj estas nepre bezonata en la artlingva problemo — volas aldoni al la supre dirita nenion plian. Jam troo estis dirita pri tio en la daŭro de la lastaj dek jaroj!

La Redakcio.

„Elskribi“, „finskribi“ kaj „esti skribanta“.

De S-o Kronenberg ni ricevis sekvantan artikolon pri nia artikolo „iom pri la verbo en Esperanto“ (N-ro I. 1928).

Kun vera plezuro mi legis la artikolon, tamen neniel mi povas kompreni la konkludon.

Se mi volas diri, ke mi ion finis skribi, mi povas uzi aŭ la formon: mi estas skribinta, aŭ mi finskribis.

„Mi elskribis“ signifas, ke mi skribis el io, ekz.: en ia fabrikejo oni donis al mi la nomaron de ĝiaj fabrikaĵoj kaj mi elskribis kelkajn fabrikaĵojn el la listo.

Pripensante plu la aferon, mi konstatis, ke hazarde de D-ro Dreher elektita verbo „skribi“ ne estas unuopa ekzemplo, ĉar same mi ne povas diri „mi elinvitis“ anstataŭ „mi estas invitinta“. „Mi elinvitis“ signifas ja: wyprosiłem, do la sencon tute malan ol: zaprosiłem. Same io alia estas

„mi elkondukis“ (wyprowadziłem) kaj „mi estas kondukinta“ (zaprowadziłem) aŭ „mi finkondukis“.

„Mi elĉerpis la akvon“ signifas, ke la akvo ne estas plu kaj tamen, se mi diras: zaczyrpnąłem wody, mi tute ne volas diri, ke mi elĉerpis la akvon (wyczerpałem wodę), sed ke mi estas ĉerpinta la akvon.

Similajn ekzemplojn ĉiu povas facile trovi kaj tio-ĉi pruvas, ke oni ne povas ĝeneraligi la fakton, ke kelkfoje (ellerni, eltrovi) la prepozicia prefikso „el“ povas signifi pasintecon finitan.

Laŭ mia opinio estas ĉiam plej bone uzi ĉe pasinteco finita la formojn kunmetitajn (mi estas leginta) aŭ aldoni al simpla formo pasinta la radikon: fin- (mi finlegis — przeczytałem, mi finiris — doszedłem, mi finskribis — napisałem).

Pri tiu-ĉi temo mi verkis antaŭ iu tempo artikoleon en svisa „Esperanto“.

Jen, kion ni trovas necesa aldoni:

1) La prefikso el- estas, laŭ sia origino, loka prefikso kontraŭdirekta al en-. Ĉiuj t. n. verboj movaj per en- ricevas la signifon: en la mezon.... -i, kaj per el-: el la mezo.... -i. Se ni imagas rondon, ni povas en ĝin eniri, enflugi, elkonduki, enĵeti, same ni povas eliri, elkonduki ktp. Tiamaniere estas plenumata ĉu pasive ĉu aktive certa movo.

2) Alie estas pri verboj ne-movaj sed - almenaŭ ĉefe kaj precipe — abstraktaj: lerni, kompreni, koni, legi, paroli, diri, kanti, pensi, observi, serĉi, trovi, peti, preĝi ktp. Tiaj verboj ne toleras en-, anstataŭe toleras el-. Sed ilia el- havas naturmaniere alian signifon ol tiu de la verboj movaj. [1] Ilia el- estas ĝuste tiu, pri kiu mi menciis koncerne elskribi. Ĝia rolo estas plilarĝigi, ĝisfine, ĝisfunde la agoenhavon de la verbo; jen la simileco de el- al, pola agofiniteco.

Ĉe Zamenhof ni trovas tian el- tiel ofte, ke mi estis sendube prava, skribante, ke ne nur en la menso de slavo, sed ankaŭ en tiu de aliaj esperantistoj el- kreis la ideon de agofiniteco. Vidu „Hamleto“: elkreski, eltrovi, eluzi (monero), elporti, elmontri, elesplori, elprovi, elfari, elteni, elpensi, elserĉi, elobservi ktp.

La uzado de el- en tiu agofiniteca signifo estas tiel ĝeneraliĝinta, ke ĝi eĉ superis la limojn de la pola wy- kiu estis ja por Zamenhof modelo. Ni trovas ekz. „elkoni“, kiun ni neniel povas traduki polen alie ol per „poznać“ (agofiniteca formo de znać, poznawać).

„Elskribi el listo“ estas tute certe: skribi el listo. Sed same „elporti“ estas ne nur znosić sed ankaŭ wynosić, „eldoni“ estas ne nur wydawać (książki) sed ankaŭ wydawać z ukrycia. Ja ĉiu lingvo estas pli aŭ malpli abstrakta kaj ĝi estas tia des pli, ju pli ĝi estas evoluinta kaj kulturita.

„Elinviti“ ne povas signifi wyprosić, ĉar inviti estas enpeti kaj same kiel oni ne povas diri „elenpeti“, oni ankaŭ ne povas uzi „elinviti“. Mi proponas kun Kuhl: forpeti (el).

„Elkonduki“ apartenas tipe al movaj verboj. Vidu 1).

„Elĉerpi“ pruvas, ke ĉerpi estas verbo abstrakta [Vidu 2)], tial ĝi signifas prave: ĝisfine, ĝisfunde, ĉerpi, tiel ke nenio pli estas ĉerpebla.

Pri fin- mi alifojie ion skribos.

Dro Leopold Dreher.

POLLANDA KRONIKO.

Kraków. Odbyty w czasie świąt Bożego Narodzenia u. r. w Krakowie III. Zjazd Federacji Akademickiej Przyjaciół Ligi Narodów powziął następującą rezolucję:

„Rozumiejąc doniosłość języka międzynarodowego dla sprawy zbliżenia ludów, III. Zjazd Federacji Akademickiej Przyjaciół L. N. w Polsce wzywa koła poszczególnych środowisk do popierania ruchu esperanckiego przez tworzenie odpowiednich sekcji lub współdziałanie z istniejącymi organizacjami esperantystów“.

Lublin. La 5. II. kj. okazis jarkunveno de loka Filio de Pola Esperanto-Asocio. Prezidanto estis elektita S-o Dro J. Mędrkiewicz, vicprez. W. Bogusławski, sekr.-kasist. Cz. Pruski, bibliotek. Cz. Pęczalska, estrarano W. Sznajdrowicz, Rev. Kom. B. Drzewiecki kaj St. Radziwiński. Krom tio gvidas kurson por laboristoj S-o Dominik Olesiuk. Estas ankoraŭ eldonita plej nova, ĉarma black-bottom kun teksto esp.-pola, aranĝita por kanto, piano kaj „jazz-band“-orkestro.

Lwów. Post jubilea kongreso en Gdańsk, Societo Esperanto ekkomencis viglan movadon. Dum internacia Orienta Foiro en Lwów estis aranĝita „Esperanto-Propaganda-Stando“. La 15.X. 1927. okazis en ĉambrego de Industria Muzeo, bone vizitata „Inaŭgura Propaganda Festvespero“. Raportoj en multaj gazetoj. La 12.XI. 1927. okazis en belege ornamita granda salono de Tehnologia Instituto plensukcesa unua koncert-vespero el ciklo: „Kanto kaj Poezio de l'Popoloj“. Ĉeestis multaj eminentuloj; ĉiuj gazetoj tre favore raportis kaj laŭdis la iniciatemon de la Societo. La 17.XII. 1927. okazis solena „Zamenhof-Festvespero“ kun partopreno de noro kaj artistoj. Du kursoj, aranĝataj de la Societo, finiĝis. Novajn kursojn gvidas s-o Schnützer (por geoficistoj de „Karpata Petrol-industria A. S.“ kaj por anoj de Pola Aeroplana Linio „Aeorolot“) kaj f-ino Nadel. La estraro de Societo, subtenata de sia protektanto S-o eksministro D-ro Władysław Stesłowicz, ĉefdirektoro de Lvova Komerca Ĉambro, faras penadojn por enkonduki Esperanton en la programon de ĉi-tiea Eksport-Akademio. La 17.I. kj. okazis ĝenerala jarkunveno de la Societo. Prezidanto estis elektita s-ano inĝ. Aleksander Wołkowicz, sekr. s-ano Schnützer. La multjara, meritplena prezidanto s-o juĝa senatano Hieronim Wierzchowski estas elektita kiel honora prezidanto.

Łódź. Senbrua kaj diligenta estas la agado de la Esperantista Societo „Laboro“. Dufoje en semajno konvenas tie societanoj. Finiĝis kurso, kiun absolvis 10 personoj. Novan kurson kun 20 personoj gvidas I. Lejzerowicz. S-o Parzęczewski gvidas kurson en juda lingvo.

La knabina gimnazio de S-ino Wolfson enkondukis devigan instruadon de Esperanto en 4. 5. kaj 6-a klaso; instruas f-ino P. Lebenštejn. Vasta propagando estas farata inter la instruistaro Lodza, en kies societo fondiĝis rondo esperantista. La 6.I. kj. okazis en la ejo de la Instruista Unuiĝo prelego de prof. Kronenberg el Warszawa. La prelego donis bonan rezultaton.

Okazos ankoraŭ granda ekspozicio esperanta, aranĝita de Esper. Societo „Laboro“. Adreso de l'sekretario: S-o D. Patt. Łódź, Nowo-Cegielniana 7.

4
Pomorze. Laŭ ĝojiga sciigo de s-ano A. Troszyński, gvidanto de Esperanto-grupo en Pelplin (pastra seminario), la tiea direktoro de la seminario kaj fervora samideano, Lia Kanonika Moŝto, P-o, Konstanty Dominik fariĝis sufragano de Kulma (chełmińska) episkopujo. Samideanajn gratulojn al Lia Episkopa Moŝto.

Warszawa. Pola Esperanto-Asocio elektis novan estraron: prez. s-ano Stanisław Karolczyk, vicprez. Kazim. Tymiński, sekr. Mieczysław Kaus, kasist. Włodzimierz Miernicki, bibliot. Marja Wagnerówna, anstataŭantoj Janina Burkatówna, E. Cense, kaj Zofja Romerówna.

Pola Studenta Esperantista Societo sukcesis komenci en Varsovia Universitato prelegojn de prof. Bujwid pri artefaritaj lingvoj kaj Esperanto. Oni devas substreki grandajn laboron kaj meriton de prof. Bujwid, dank' al kiu ni havas jam Esperanton en nia Universitato. P. S. E. S. vigle laboras. Estas gvidataj du kursoj: la unua de Halina Weinsteinówna, la alia de M. Trochimowski. La kursoj okazas dufoje semajne: merkrede kaj sabate.

La 21.1. t. j. komenciĝis prelegoj en Universitato de prof. O. Bujwid. La unuan publikan prelegon pri artefaritaj lingvoj kaj Esperanto ĉestis 121 personoj, precipe univers. studentoj. Dum la kvina prelego profesoro jam komencis iom post iom paroladi esperante, komence skribe, sur la tabulo, klarigante nekonatajn vortojn en pola lingvo; jam de post la sesa prelego, la aŭdantaro komencis kompreni la tralegitan tekston. Post la sepa prelego sekvis jam la skriba ekzerco, pri kies rezultoj ni skribos en la venonta numero.

KRONIKA ZAGRANICZNA.

W Helsingforsie wychodząca gazeta dla dzieci „Punalippe“ (Czerwony Sztandar) zamieszcza tekst esperancki i tłumaczenia z gazet esperanckich.

Z okazji 40-lecia Esperanta, wydała Rep. Sowiet. znaczek pocztowy z portretem Dr. Zamenhofa, twórcy Esperanta. (Marto-Decembro 1927).

W kursie pisemnym esperanta, prowadzonym przez Szwedzką Federację Esperancką, wzięło udział 3000 kursistów.

Lekarskie czasopisma japońskie przyjmują Esperanto. „Przegląd Farmakologiczny“ podaje streszczenia artykułów po esper.

Instytut Meschini, utrzymujący szkoły we wszystkich miastach Włoch, wprowadził Esperanto do swego planu nauki.

Kongres stenografów w Brukseli (4—8 sierpnia 1927) przyjął jednogłośnie następującą rezolucję: „By umożliwić normalny rozwój Esperanta, jest wskazanem, by wszystkie organizacje esperanckie spowodowały wyczerpanie się stenografji esper. i zakładały grupy początkujących stenografów-esperantystów“. „Internacia Asocio de Esperantistoj-stenografoj“ uzyskała złoty medal za udział w wystawie.

Przywódcą ślepców-esperantystów, ociemniały Szwed Thilander, redaktor dziennika ślepców „Esp. Ligilo“, wydawca „międzynarodowej biblioteki Brajla“ obchodził 25 paźdz. 1927 r. 50-lecie swych urodzin.

Ilość stacji radjowych, nadających Esperanto lub o Esperancie wynosiła do połowy listopada 1927: 149 stacyj w 32 państwach,

z czego było :	w Azji . . .	10	stacyj w 3	państwach
	w Australji .	10	„ 2	„
	w Ameryce .	26	„ 5	„
	w Europie .	103	„ 23	„

Między innemi przybyła radjostacja w Krakowie.

CENTRA ESPERANTO LIBREJO.

En la jara ĝenerala kunveno de akciuloj de la Anonima Societo „Centra Esperanto Librejo“ en Hago (Naderlando), la bilanco, perdakaj gajnakonto estis aprobitaj kaj la dividendo fiksita je 6% (antaŭan jaron 5¹/₂%). Kiel komisaro estis reelektita S-ro J. Ravestein Jr.

KOMUNIKOJ P. E. D.

P. E. D. ree memorigas pri la nepra neceso pagi la kotizon por K. R. en Ĝenevo pere de la ĝen. sekr. S-o Alfus, Kraków XXII. Aleja Dembowskiego 10.

NE FORGESU, KE DUM LA PENTEKOSTO EN KRAKÓW ESTOS TUTPOLL. ESPER.-KONGRESO. PRI DETALOJ NI SKRIBOS EN VENONTA NUMERO.

ALVOKO DE LA REDAKCIO.

Ni petas insiste ĉiujn kunlaborantojn, ke iliaj manuskriptoj estu ĉiam maŝinskribitaj. Artikoloj manskribitaj ne estos presataj.

RESPONDOJ DE LA REDAKCIO.

Dro Róbin, Warszawa. Ni tre dankas por intereseĝaj detaloj pri la historio de la unuaj tempoj de esperanto movado en Polujo. Publikigota.

S-o Šapiro, Białystok. Ni volonte petas Vin pri afabla kunlaborado.

S-o Swirtun. Via komunikaĵo restas kaj atendas favoran okazon.

S-ro M. Demidowicz en Brześć. Responde al via letero la tradukinto de „Iridiono“ klarigas: 1) En la ekzemplero de „Iridiono“, uzita de la tradukinto (Wybór Pisarzy Polskich dla szkoły i domu, Gebethner i Wolf, Warszawa, 1908), en la koncerna loko anstataŭ „morze“ estas „może“, kio efektive ŝanĝas la sencon. Post la korekto p. 7, v. 3 de mals. devas soni: „...maro ĝis nun sennoma, ĉiam ondanta al la feliĉaj bordoj..“ Dankon por la rimarko! 2) p. 8 v. 14 kaj 15 de supre: Masiniso prezentas bildon de la *estontaj* regantoj de Romo, pro tio la predikato estas en tempo estonta. 3) Koncerne la vorton „*avidi*“ — ĝi havas ne nur materialan signifon. (Rig.: Kabe: Vortaro de Esperanto).

ONI ALSENDIS AL LA REDAKCIO.

Kalendarz Astrologiczny, Fr. Prengel. Bydgoszcz p. 1.50 zł.

Raportaro de lingvaj institucioj, enhavas diversajn raportojn el la kunsidoj en Danzig-Gdańsk dum la XIX. kongreso. Precipe lingvaj demandoj kaj raportoj pri teknikaj vortaroj.

Polska Wolność, Warszawa, semajna gazeto en la nroj 5 kaj 6 enhavas artikolojn pri Esperanto kaj esper. kursoj.

Poczta, dusemajna gazeto de poŝtistoj en Warszawa, enhavas informojn pri disvastigo de Esperanto en diversaj landoj kaj priparolas ILEPTO.

PAX organe hebdomadaire independent d'économie et de politique industrielle. Directeur-fondateur Paul Girard. Directeur politique Jaques Seydoux. Paris 18 rue Tilsit, Genève 30 rue du Rhône.

Głos Nauczycielski. Tygodnik, centralny organ Związku Polskiego Nauczycielstwa Szkół powszechnych. Red. naczelny Roman Tomczak. Warszawa. Depost la kreo de la Esperanto-Sekcio de la Instruistoj preskaŭ en ĉiu numero aperas novaĵoj pri esperanto-movado. En la 4-a nro aperis la regularo de la Sekcio, en la 6a informoj pri kursoj kaj pri lernolibroj.

ADMINISTRACIAJ SCIIGOJ.

I. GARANTIA FONDO DE „POLA ESPERANTISTO“.

Por Garantia Fondo de „Pola Esperantisto“ pagis jam:

Prof. Jerzy Loth (Warszawa) — 50 zł. S-o Peksa (Czarny Dunajec) por IX. — 10 zł., por X. — 10 zł. D-ro Róbin (Warszawa) por XI. — 20 zł., por. XII. — 20 zł. S-ino Neuberger por I. — 10 zł. S-ino Rubinstein por I. — 10 zł. F-ino Weinsberg por I. — 5 zł.

II. GARANTIA ĈENO DE „POLA ESPERANTISTO“.

1. F-ino Halina Weinsteinówna pagis 3 zł. kaj alvokas pagi laŭvolan sumon: S-ojn Herman Grynszpan (Celestynów), Juljusz Pomorski kaj Włodzimierz Miernicki (ambaŭ el Warszawa).

2. S-o Alfus pagas 5 zł. kaj alvokas: S-ojn Dro Dreher, Salo Grenkamp (Paryĝ) kaj Teo Jung (Horrem b. Köln).

3. S-o Hodakowski pagas 2 zł. kaj alvokas: S-ojn Ordyński kaj Czajowski (ambaŭ el Kraków).

4. S-o Zimmels pagas 2 zł. kaj alvokas S-inon Dr. Rosenthalowa.

5. S-o inĝ. Wassermann (Jarosław) pagas 2 zł.

6. S-o Rubinlicht (Kraków) pagas 2 zł.

!! V I V U S E K V O N T O J !!

III. NIAJ REPRESENTANTOJ EN KATOWICE, PARIS KAJ WARSZAWA.

Ni atentigas niajn ŝ. gelegantojn, ke ni donis reprezentadon de nia revuo: en Katowice al „Societo de Esperanto-Amikoj“, en Paris al s-o Salo Grenkamp, rue de Vaugirard 4; en Warszawa al „Pola Studenta Esperantista Societo“ Leszno 99 m. 5. Bonvolu do aboni, pagi anoncojn, mendi librojn kaj gazetojn ktp. pere de niaj reprezentantoj.

NE FORGESU RENOVIGI VIAN ABONON POR „POLA ESPERANTISTO“. ĜI KROME BEZONAS MULTAJN NOVAJN ABONANTOJN!
PRO TIO ANKAŬ VARBU POR ĜI!

Redaktor odpowiedzialny: Juljusz Kriss.

Odbito w drukarni Gronusia i Orłowskiego w Krakowie, ul. Stolarska 6. Tel. Nr. 1018.

Vi deziras, ke viaj geknaboj interesiĝu pri Esperanto ?

Abonu ilin al „LA ETULO“ monata gazeto ilustrita por geknaboj.
Provezempl. havebl. ĉe la administr. 55 Rue de Vaugirard, Paris.
aŭ ĉe M. Janik, Hajduki Wielkie, ul. Wolności 29. Woj. Śląsk.

EDZIĜOJ: F-ino Irena Schleichkorn, filino de S-o Leon Schleichkorn, multjara meritplena estrarano de Societo „Esperanto“ en Kraków, edziniĝis la 29. I. kj. kun S-o Ignacy Baumfeld el Wien. Korajn gratulojn!

En Zakopane edziniĝis la 28. I. kj. f-ino Walentyna Kotońska kun s-ro Józef Antoszyk bankoficisto en Bielsko.

F-ino Anjo Fels, filino de ges-roj Dro Fels, multjaraj meritplenaj membroj de Societo „Esperanto“ en Lwów, edziniĝis kun s-ro Dro D. Heftel. Korajn gratulojn!

ĜENIAJ KUNVENEJOJ.

BIALYSTOK: Zamenhofa Esperanta Societo, ul. Zamenhofa 14a. ĉiutage de 7—11 vesp. Biblioteko, legejo, klubo, kursoj.

DĄBROWA GORNICZA: Esperantista Sekcio ĉe T. U. R. ul. 3-go Maja 14. ĉiudimanĉe de 3—7 vesp. kaj ĉiŝaŭde de 4—6 vesp.

KATOWICE: Societo de Esperanto Amikoj: monatkunvenoj — 7 Marto kaj 4 Aprilo kj. je la 20 h. en Grand Restoracio de S-o Naleppa ul. Kościuszki. Krom tio ĉiumerkrede post la 20 h. ĉe gastotablo en la sama restoracio.

KRAKOW: Pola Esperantista Klubo, ul. Smoleńska 9. (Industria Muzeo) ĉiulunde de 8—9 vesp.

Societo Esperanto, ul. Smoleńska 9. (Industria Muzeo, ĉambro 130) ĉiulunde kaj ĉiumerkrede de 8—9 vesp.

KRÓLEWSKA HUTA: Rondo Esperantista: monatkunvenoj ĉiun unuan ŝaŭdon en la monato en Dom Polski, ul. Wolności 64. je la 8 vesp.; ĉiujn aliajn ŝaŭdojn en lernejo XII. ĉambro 12. ul. Katowicka ekzercvesperoj por gejunuloj je la 6—7½ vesp., por membroj je 7½—9½ vesp.

WARSZAWA: Akademia Esperantista Rondo ĉe Juda Akademia Hejmo: Nowy-Świat 21. tel. 404-29. Sekretariejo kaj biblioteko ĉiudimanĉe kaj ĉiŝaŭde de 8—10. Ĉiŝabate dancadoj de 9½—2 nokte.

Esperantista Rondo „Konkordo“, ul. Marszałkowska 141. l. 17. Tel. 194-01. Ĉiumarde de la 8½—10 vesp.

Laborista Esperantista Societo „Laboro“, Nowogrodzka 21. ĉiumarde de 5—8 vesp. kaj ĉiŝabate de 7—9 vesp.

Pola Esperanto Asocio, ul. Bracka 18 (oficina poprzeczna I p. lokal Związku Naucz. Szkół Średnich i Wyższych) ĉiŝaŭde de la 7—11 vesp. Biblioteko, legejo, kursoj.

Pola Studenta Esperantista Societo, Leszno 99 m. 5. Tel. 198-37 ĉiumarde de 7-8½ vesp. kaj ĉiŝabate de 8-10½ vesp.

LIBREJA FAKO

DE

POLA ESPERANTISTO.

REKOMENDAS:

	Zł.
<i>Albanio</i> . Gvidlibro	0·60
<i>Albumo</i> de l'VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15·—
<i>An-Ski</i> — Dibuk. Teatraĵo	1·25
<i>Balucki</i> — Kuzeto. Komedio en traduko de S. Grenkamp	0·60
<i>Białystok</i> — Gvidlibro tra urbo de nia Majstro	0·60
<i>Blicher</i> — Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto	1·20
<i>Bujwid O. prof.</i> — Kvin prelegoj pri bakterioj	1·—
<i>Bukedo</i> — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1·20
<i>Bulthuis</i> — Malriĉa en spirito. Dramo orig. en E.	1·40
<i>Butin</i> — Faŭsto. Komentario al la I-parto	0·60
<i>Czubryński</i> — Esperanto i Esperantyzm	1·20
— Esperantyzm. Wyd. II.	3·—
<i>Fredro</i> — Consilium facultatis. Komedio	1·50
<i>Grenkamp</i> — Krioj de l' koro. Poeziaĵoj	0·50
— Penseroj. Legindaj precipe en kursoj	0·75
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig — Gdańsk eldonita de la P. E. D. Kraków 1927	1·50
<i>Jung</i> — La Alta Kanto de la Amo	1·80
<i>Kongreslibro</i> de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita	1·—
<i>Kriss</i> — Melodioj de l' nokto. Poeziaĵoj	0·80
<i>Mickiewicz</i> — Improvizacio de Konrad	0·50
<i>Oberrotman k. Jung</i> — La lastaj tagoj de D-o Zamenhof ,	2·50
<i>Poŝtkartoj</i> esperantaj ilustritaj, 10 diversaj. Bonega propagandilo	0·60
<i>Prus</i> — Pekoĵoj de l' infaneco	1·20
<i>Rieck</i> — Oni ridas. Humoraĵoj	1·40
Ŝlosiloj esperantaj en 10 lingvoj (ankaŭ la pola)	1·—
<i>Turno</i> — Kompletny podręcznik Esperanta (II wyd.)	1·25
<i>Wiesenfeld</i> — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj	2·40

POR SENDKOSTOJ ALDONU 10% — NUR ANTAŬPAGO.

KRAKÓW, UL. SMOLEŃSKA 9.
KONTO P. K. O. 406.660.